MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 11

NOVEMBRO 2019 Kol. 415/35

xxxx

Estas tre grave diri, ke Oktobrofesto de Blumenau estas la dua plej granda en la mondo.

Blumenau situas en la suda regiono de Brazilo kaj estas konata pro siaj eŭropaj originoj. La urbo estis koloniigita en 1850 de la germana apotekisto, kuracisto kaj filozofo D-ro Hermann Bruno Otto Blumenau, kiu alvenis la 2-an de septembro de tiu jaro akompanata de 17 aliaj setlantoj, ankaŭ el Germanio. Poste pli multaj enmigrintoj alvenis el Italio kaj Pollando.

Blumenau havas grandan diversecon de metiaj bierfarejoj tra la urbo kaj en najbaraj municipoj. La urbo havas ankaŭ multajn muzeojn, preĝejojn, placojn, naturajn vidindaĵojn, monumentojn, same kiel arkitekturon, ĉar multaj domoj portas la karakterizan stilon de Germanio.

Tiu urbo elstariĝas en pluraj sektoroj de la ekonomio. Inter la ĉefaj estas la tekstila merkato kaj informa teknologio.

Ĝi ankaŭ havas multajn eventojn, festojn kaj festivalojn respondecajn pri kresko de la loka ekonomio kaj movado de miloj da turistoj dum la jaro.

Oktobrofesto estas la plej granda germana festivalo en Sud-Ameriko.

De Liette Lela el Brazilo

Esperanto – lingvo por ĉiuj

Tio estis la titolo de prelego por partoprenantoj de la renkontiĝo de familioj kun handikapitaj infanoj kaj iliaj helpantoj vendrede la 11-an de oktobro 2019. Tiun ĉi semajnfinan renkontiĝon organizadas *Mirabilis*, societo por subteno de asista servado (de handikapitaj infanoj kaj junuloj) ĉiujare en la feriejo *Tábor Jana Ámose Komenského* (*TJAK)* en la vilaĝo Běleč nad Orlicí (proksime de *Hradec Králové*). La subtitolo de la prelego estis „Historio – Nuntempo – Estonteco“, pro tio mi komencis paroli pri la personeco de L. L. Zamenhof, la unua E-gazeto, la unua internacia kongreso aŭ ideoj kaj principoj de E-gramatiko. Poste mi prezentis IFEF-kongresojn, E-organizojn kaj societojn (ekz. ĈEA, IFEF, ĈeFEA, AEH), E-kulturon, radio- kaj televid-elsendojn. Konklude estis menciita estonteco – junularaj organizoj, E-lernado en lernejoj, universitatoj, aktivecoj de IFEF por studentoj de transportaj fakultatoj, Esperanto kiel EU-lingvo ktp. En sekvanta diskutado eksonis ordinaraj demandoj, ekz. „Kiel disvolviĝas Esperanto en ekzaktaj, teknikaj sferoj?“ sed ankaŭ „Kaj vere vi parolas kun ĉiuj partoprenantoj de kongresoj en Esperanto?“ Kelkaj aŭskultantoj sciis pri Esperanto, sed ĝis nun ne konis persone iun esperantiston. Do mi esperas, ke mi transdonis al ili

interesajn informojn pri nia internacia lingvo. Por pli multe da informoj (en la ĉeĥa lingvo) pri la societo *Mirabilis* – vidu www.mirabilis.cz kaj pri *TJAK* – vidu www.taborbelec.cz.

Jaroslav Matuška

Kongreso de ĈEA Brno, oktobro 2019

La ĉi-jara kongreso de ĈEA en Brno estis jubilea – kaj tre sukcesa! Eble vi, ĉiuj legantoj, scias, ke antaŭ 50 jaroj estis renovigita la ekzisto de nia asocio, ĉar en la malhelaj kvindekaj jaroj tiama la komunisma reĝimo devigis la tiaman asocion likvidi sin mem.

Do printempe en la jaro 1969 la Ĉeĥa Esperanto asocio reviviĝis. Okazis tio en Brno, en Besední dům (Domo de societoj). Estis tiam 400 ĉeestantoj.

Nia ĉi-jara oktobra kongreso estis eminente kaj zorgeme preparita de anoj de Esperanto-klubo en Brno kunlabore kun komitato de ĈEA. Ili proponis vere buntan kaj interesan programon.

Estis sufiĉe multaj prelegoj, kiuj havis diversajn temojn – la slovaka diplomato Jozef Reinvart kaj la irlanda diplomato, prezidanto de EEU (Eŭropa Esperanto Unio) Seán Ó Riain parolis pri projektoj: Esperanto kiel kultura heredaĵo, disvastigo de Esperanto en lernejojn, enkonduko de Esperanto en Eŭropan Union ktp.

La ceteraj parolantoj prezentis KER-ekzamenojn de UEA, UKon en Lahti 2019, la historion de la Esperanto-movado en Ĉeĥa respubliko, la personon de la juna esperantisto Petr Ginz, pereinta en nazia koncentrejo, Internacian Junularan Esperanto-kongreson 2019, la personojn Louis Braille kaj Hieronimo Lorm

(blinda kaj surde-blinda homoj, gravaj por la aliaj, same handikapitaj), Esperanto-instruadon.

Tre interesa, kortuŝa, estis rakontado de la 94-jara aŭstria esperantisto Martin Stuppnig, ne-kredeble vigla veterano de la dua mondmilito, en la Mahen-biblioteko. Plena salono de ne nur esperantistoj, sed ankaŭ publiko, senspire aŭskultis pri liaj militaj travivaĵoj. Okazis ankaŭ lanĉo de lia libro (ĉeĥa versio) Home en senhomeco.

En la biblioteka spaco preparis la anoj de EK Brno vidindan ekspozicion „50 jaroj de ĈEA“. Belaspekte, bone profesie preparita ekspozicio.

La partoprenantoj vizitis ankaŭ por esperantistoj gravan „Besední dům“ (Domon de societoj). Sperta ĉiĉerono parolis pri la interesa historio de la domo, el kies balkono estis proklamita en Brno la Ĉeĥoslovakia respublika en la jaro 1918 ni povis admiri la koncertan salonegon, la similan, sed iom pli malgrandan ol tiu en Vieno. Do tie antaŭ 50 jaroj reviviĝis nia nuntempa ĈEA. Kelkaj tiamaj partoprenantoj de la tiama evento estis inter la nuntempaj vizitantoj.

Sabate kaj dimanĉe antaŭtagmeze okazis laborkunsido de la kongresanoj kaj baloto en novan komitaton de ĈEA. La komitato plimultiĝis je du anoj, do nuntempe ĝi estas denove sespersona.

Krome la labor-traktado kaj prelegoj oni ankaŭ amuziĝis – estis bela ekskurso al Slavkov-kastelo – vizito de Tombomonto de Paco kaj muzeo pri „Batalo de tri imperiestroj“ (Tiu de vi, kiu ne konas la lokon, mi rekomendas viziti ĝin).

Sabate dum societ-plezura vespero oni dancis ĉe belsona muziko kaj amuziĝis pri mult-objekta tombolo.

La kongreson vizitis 94 partoprenantoj se enkalkuli gastojn de eksterlando: Slovakio, Aŭstrio, Germanio, Pollando, Francio, Hungario, Irlando kaj Meksikio (18-jara tre simpatia studanto en Germanio), do entute de 8 landoj. Grava kaj rezulto-esperiga estis aktiva partopreno de junularo kaj ties delegito.

L. Chaloupková

T r i s t a j i n f o r m o j

Louis - Christophe Zaleski – Zamenhof

Ni ricevis informon, ke la 9-an de oktobro 2019 en Parizo forpasis Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto L. L. Zamenhof. Li estis doktoro inĝeniero pri surlanda kaj enmara konstruado, aparte pri premŝtalbetono, loĝis en Parizo kun sia edzino Juliette, naskita Sekrecka, parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan, havis la francan kaj polan civitanecojn,

estis honora urbano de Bjalistoko.
Jam antaŭ la dua mondmilito, li lernis Esperanton kaj partoprenis Esperanto-kongresojn, nome en Stokholmo – 1934, en Romo – 1935, en Vieno – 1936 kaj en Varsovio – 1937, kie li, komisiita de la familio Zamenhof, unuafoje salutis la kongresanojn. Post la milito li partoprenis pluajn kongresojn: 1958 en Majenco, 1960 Bruselo, 1987 Varsovio, 1988 Brajtono, 1992 Vieno, 1998 Montpeljero, 1999 Berlino, 2003 Gotenburgo, 2005 Vilno, 2008 Roterdamo, 2009 Bjalistoko, 2015 Lillo, kie li kutime ankaŭ salutis la kongresanojn kaj pro sia origino fariĝis allogaĵo por ĵurnalistoj kaj ankaŭ por la kongresanoj. Kelkajn el la kongresoj vizitis ankaŭ membroj de nia AEH kaj renkontis sinjoron Zaleski-Zamenhof persone. Ing. Josef Hron

Helena Štruncová

En monato oktobro forpasis anino de AEH Helena Štruncová el Prago, 94-jaraĝa. Ŝi estis prezidantino de la praga klubo inter la jaroj 1984-88 kaj tiu ĉi periodo apartenis al la plej bonaj kaj fekundaj en la historio de la klubo. Ŝi estis ankaŭ kursgvidantino kaj edukis vicon da esperantistoj en la kurso por progresantoj. Samtempe ŝi kontribuis al la kluba Bulteno, por kiu ŝi verkis kaj tradukis multajn artikolojn. Krome ŝi estis ankaŭ membro de la redakcia rondo de Starto. Post la jaro 1989 ŝi ne plu partoprenis la kunvenojn de la klubo, sed tamen ĝis nun la klubon, same kiel AEH ŝi malavare subtenadis. El la praga Bulteno

František Frýbert

La 7-an de oktobro 2019 mortis post longa grava malsano 90-jaraĝa iama ano de AEH František Frýbert (*17.9.1929). Li estis la nestoro de la ĉeĥaj radioamatoroj-esperantistoj kaj ekde la jaro 1948 li aktivis en la Esperanto-klubo en Brno. Ne povante vojaĝi fizike, li komencis vojaĝi almenaŭ per radio kiel radio-amatoro kaj esperantisto, kio respeguliĝis ankaŭ en liaj klubaj prelegoj: *Radio-komunikado inter esperantistoj, Perradia konekto de la ŝipo Titanik, Radioamatoroj kaj Esperanto, ILERA: Esperanto inter radioamatoroj*. Tiam li ankaŭ membris en la amatora teatra grupo Verda Masko. M. Malovec.

Honoron al iliaj memoro.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.